

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Vi aŭdos radioprelegon redaktitan antaŭ kvin jaroj de Charles Ecabert kaj dediĉitan al Hector Hodler. Dum tiu ĉi jaro ni aludis al grava datreveno de la okdeka jaro de la publikigo de la *Unua Libro*. 1887 estis ne nur la naskiĝjaro de la Lingvo internacia, sed ankaŭ de Hector Hodler. Tiurilate aŭdu la dirojn de Charles Ecabert :

A.- « *La saman jaron [1887] naskiĝis en Svislando homo, kiu ludis unuarangan rolon en la vicoj de la esperantistaro ne nur svisa sed tutmonda, tiu estas Hector Hodler. Ni pensas, ke estas oportune kaj utile signi tiun datrevenon per rememora parolado.*

Cl.- *La patro de Hector Hodler, Ferdinand, estas rigardata kiel unu el la plej grandaj pentristoj en nia lando. Post jaroj de mizero kaj nekonateco li forĝis al si tute propran stilon kaj iris novan vojon, kiu altiris al li akrajn kritikojn kaj perfidajn atakojn, ĝis en 1900, kiam la svisa registaro mendis murpentraĵon por la nacia muzeo en Zürich, protektante la malkomprenitan artiston kontraŭ la muzea komisiono kaj la plimulto de la gazetaro, kiuj mallaŭdis lian tiel nomitan fuŝprojekton.*

A.- *Temis pri la nun famega pentraĵo **reiro de la svisaj batalintoj el Marinjano 1515**, dum la italaj militkampanjoj. Ĝi glorie rivelis la genian kapablon de Hodler reprezenti homojn realajn en la tuta forto de ilia doloro kaj nevenkita kuraĝo. La nova stilo hodlera esprimas laŭ Stettler : « la spiritan gravecon de la okazintaĵo,*

Cl.- *pli ol kiel antaŭe la plaĉantan grupiĝon, detaletojn de l' kostumo kaj belajn heroojn kun frizitaj haroj. »*

A.- « *La pentr-maniero de Hodler karakteriziĝas per viraj trajtoj kaj sobraj linioj ĉu de la homoj, ĉu de la pejzaĝoj, per vivaj naturaj koloroj : flavoj, verdoj, bluoj antaŭ ĉio, larĝe kaj senhezite surmetitaj. Akreco, forteco, sobreco estas liaj fundamentaj kvalitoj.*

Cl.- *La samaj reveliĝas en la persono kaj agado de lia filo Hector. Li naskiĝis la 1-an de oktobro 1887 en Ĝenevo. Fakte lia patrino estis ĝenevanino. Tre forta amo ligis al ŝi la filon. Edmond Privat, junec-kamarado de Hector Hodler, skribis pri li en la revuo **Esperanto** :*

A.- « *Kiam mi 12-jara eniris gimnazion, mi tuj rimarkis tiun novan kamaradon altan, malgrasan, malriĉan, kun mirindaj okuloj kaj senordaj haroj kronantaj lian belan grekan frunton. Lia neforgesebla figuro aperis sur pli ol unu pentraĵo de la patro. »*

Cl.- *Plue rakontas Privat :*

A.- « *Ni faris kune longajn promenadojn, diskutante kiel knabinetoj pri la profundaj misteroj de l' socia vivo. »*

Cl.- *Rimarku la tute nekutimajn temojn de iliaj junulaj diskutoj : tie kuŝas signo de natura inklino, de vera vokiĝo, kiu orientis ilian tutan ekzistadon. Ambaŭ eklernis esperanton kaj post tri semajnoj jam flue interparolis. Ili fondis klubon kaj ĵurnaleton **La Juna Esperantisto**.*

A.- « *La redakcio sidis dum 5 jaroj, aldonas Privat, sur la sama benko de la klasejo. Dum kiom da lecionoj pri matematiko ni gluis poŝtmarkojn, skribis adresojn aŭ legadis patrajn leterojn de profesoro Cart aŭ D-ro Zamenhof. »*

Cl.- *Iom poste la du amikoj lernis kune Idiom Neutral kaj Bolak por konvinkiĝi ĉu esperanto estas la plej taŭga internacia lingvo. La provo estis decidiga.*

A.- *Eĉ ne fininte la gimnazion Hector Hodler sin dediĉis tute al esperanto, redaktis **Junan esperantisto**-n, verkis artikolojn en **Tra la mondo** kaj tradukis modele la novelon de Bernardin de St-Pierre : **Paŭlo kaj Virginio** (1905).*

Cl.- *Flanke de alta idealismo, Hector Hodler havis en si grandan praktikan senton, kaj pensadis kiel li povus organizi esperanton kaj igi ĝin uzebla tra la tutmonda popolo. « Al tio, kion iniciatis la genio de Zamenhof sur kampo lingva, skribas Privat, li aldonis la necesan bazon sur la kampo socia. »*

A.- *1906, okaze de la 2-a Universala Kongreso en Ĝenevo lin multe interesis la proponoj de Rousseau kaj Carles pri la esperanto-konsuloj, en kiuj li vidis realigebla sian planon, nome : organizi reciprokan sinhelpon inter bonvolaj homoj. En tio kuŝas la ĝermo de UEA.*

Cl.- *Dank' al 19-jara Hodler la revuo **Esperanto**, kies redaktadon kaj poste posedon li transprenis de Paul Berthelot, fariĝis la centra organo de esperantismo. Li aperigis ĝin pli ol 13 jarojn regule. Iom post iom la ideoj de Rousseau kaj Carles pri la konsuloj kunfandiĝis kun liaj planoj tiel, ke la 28-an de aprilo 1908, preparata per serio da artikoloj en la revuo **Esperanto** fondiĝas UEA (Universala Esperanto-Asocio). Pere de ĝi intencis Hodler « krei fortikan ligilon de solidareco inter diverslingvanoj ».*

A.- *Ĉiu esperantisto bone konas kaj uzas la **Jarlibron** kiu sur lia skribotablo postenas apud la plej utilaj laboriloj : oni ĝin ŝuldas al la klarvidanta kaj obstina agado de Hodler. Aliflanke la revuo internacia **Esperanto** daŭrigas lian entreprenon kaj por ĉiam vivigos la nomon de li kiel de ĝia fondinto.*

Cl.- *Prave karikaturisto lin reprezentis iam tenante en mano reton de telegrafaj fadenoj ĉirkaŭ la tuta mondo. Efektive dank'al UEA, dank'al ĝiaj organizoj kaj delegitoj, ĉiuj partoj de la mondo interrilatas per reto de servo kaj amikeco.*

A.- *Multegon da artikoloj publikigis Hodler en la revuoj **Juna Esperantisto**, **Tra la mondo** kaj **Esperanto**. Lia stilo estas nobla kaj humaneca kiel lia animo. Kiel antaŭe dirite, oni retrovas en liaj paĝoj la samajn ecojn, kiajn en la arto de la patro Ferdinand : larĝajn perspektivojn, majestatan movon de la penso, klasikan purecon de la lingvo. Sin mem li portretis per trajtoj de s-ro Laborulo, en artikolo aperinta dum decembro 1913 kun la titolo : **Pripensoj**. Aŭdu Hector Hodler :*

Cl.- *« Mi estis eltironta konkludojn el la supraj pripensoj, kiam meze de duonkonscia cerbumado, prezentigis al mi subite, mi ne scias kial, la bildo de nia amiko Laborulo. Utilos verŝajne, ke mi lin prezentu, ĉar el ni li ne estas bone konata. Sinjoro Laborulo ne estas tre eminenta persono. Malofte vi vidis lin sur estrado. Se li tamen kuraĝas ekparoli – cetere ne per brilaj frazoj – tio estas pli por esprimi opinion kaj ideon, ne ĉiam malpravan, ol por ĝui aplaŭdojn... Unu aŭ dufoje en la semajno li faras esperantan kurson. Li pensas ne sole instrui la lingvon sed ankaŭ ĝin utiligi. Li atentigas la instruistojn, ke esperanto estas viva lingvo kaj kiel ĉiu tia lingvo devas esti respektata. Li gardas ilin je ŝanĝemo aŭ gramatikomanio, sed same gardas sin insulti tiujn, kiuj ne pensas same... Tiu strangulo ne ĉiam surportas la verdan stelon nek al ĉiuj personoj parolas pri esperanto. Tamen la elektitaj personoj, kiujn li varbis, estas seriozaj kaj fidelaj al nia movado... Cetere, mia konatulo, mi tion forgesis diri, estas nek heroo, nek apostolo, nek pioniro. Li estas simple... Laborulo. »*

A.- *Karaj geaŭdantoj, konkludis Charles Ecabert, ni ĉiuj estu tiaj Laboruloj. Tiamaniere la mesaĝo de Hodler daŭre efikos. »*

Cl.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !*

Charles Ecabert : *Hector Hodler*
Claude Gacond, 219-a radioprelego, 1967.12.20 & 1967.12.23

-oOo-